# HEJS

## JUNULARA SEKCIO

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

REDAKTORO: Sro. J. M.ª SERRANO

Nro. 65 - 1969 Mercería, 7, 3.º - TARRAGONA (Hispanujo)




Kultura Kunveno en la Junulara Restadejo
en Monistrol de Montserrat (Barcelono)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Ankaŭ dank' al diversaj eksperimentoj kaj spertoj de eminentaj fakuloj, oni scias ke en la maro ekzistas multe da solvitaj mineraloj kiuj per specialaj novaj procedoj povas esti eltiritaj kaj industriigitaj laŭ modernaj kaj efikaj metodoj. Aliparte, ne estas necese emfazi la gravecon de l' atingaĵoj en la astronomia kampo. Potencaj teleskopoj kaj grandiozaj radaroj tre funde esploras la universon kaj malkovras malproksimajn objektojn aŭ kaptas signalojn signojn el la plej malproksimegaj mondoj aŭ galaksioj. La galaksioj estas amaso de ĉirkaŭ 100 miliardoj da steloj, interne de kiu troviĝas nia suno. La galaksioj havas formon de ovala plata kuko, kun diametro de ĉirkaŭ 100.000 lumjaroj kaj diko de ĉirkaŭ 10.000 je la centro.

Fakte, la menciitaj signaloj ne temas pri morsesignoj, almenaŭ laŭ nia nomenklat uro ĉar tia teknika koincido estas neebla, sed komprenebla montras al ni sendiskute ke aliaj vivantaj estaĵoj nekonataj de ni, intencas-malgraŭ la spaca distanco-interkomunikiĝi kun aliaj entoj el similaj aŭ ne similaj astroj, tio kio pruvas la mondpluralecon. Hodiaŭ neniu diskutas tiun fakton antaŭ la novaj konoj pri la grandega disvastiĝado de la galaksioj kiuj ampleksiĝas ĝis miloj da milionoj da kilometroj. La kaptado de tiaj signoj estas tute ankoraŭ mistero, des pli ke ni posedas taŭgan ŝlosilon por iomete deĉifri la cititajn elektronajn te kstojn sed almenaŭ montras la sciencan progreson el la terloĝantoj kaj ties specialan instrumentaron kiuj postulis grandegajn elspezojn kaj ĉiutagajn traserĉadojn de tre kulturitaj homoj.

N i estas en plena atomerao kaj pro tio la ĉiuspecaj sciencistoj efektivigas programojn vere mirindegajn kies kolosaj proporcioj kaj celoj estas geniaj. Unuvorte: la spaca konkero kaj la esploro de la planedoj pere de raketoj, artifikaj satelidoj kaj la kuraĝo de lakosmonaŭtoj pruvas la hodiaŭan febron kiu instigas la nacioj, speciale Rusujo kaj Usono freneze konkuri kun la celo esti la unua aluniĝonto. Senbezone diri, ke tiaj konkeroj kaŭzas fantastajn elspezadojn kaj riskoplenajn femdoj, en la ŝtakasoj kiesvalutorezervo rapide elĉerpiĝas. Vere estas ankaŭ ke tiaj programoj havas propaçajn celojn, sed tute same estas certe ke kiel diras proverbon: "Per bonaj intencoj kaj pro mesoj estas pavimita la infero.

Pro. JAIME ARAGAY

!O!!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O! )5( !O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

" ESPERANTO GRUPO STELO DE PACO "

Coop. de Tejedores a Mano

Str Teruel 26 BARCELONO 12

Januaro la 10-an je la 20ª horo:
Projekciis lumbildojn ko... ajn pri Anglujo fraulino Maria Teresa Magria estrarino de HEJS DUM KELKAJ JAROJ

Januaro la 24-an je la 20ª horo:
Prelego de Profesoro Jesús Paluzie pri la Temo:
La Nuntempa Kosmonavigado"
La prelego estos kompletigata per projekcio de diapozitivoj.

7e7e7e7e7e7e7e7e7e7e7e7e7-

BARCELONA PROVINCA RENKONTIĜO EN MANLLEU

Laŭ la lastaj sciigoj de la antaŭa kunveno de la reprezentantoj de la E-G de nia provinco oni decidis la jenajn punktojn:

a) La urbo elektita estas MANLLEU

b) La Renkontiĝo okazos en la monato JUNIO

c) Kiel la antaŭa Renkontiĝo organizis ĝin samideanoj de Centro Esperanto Sabadell kaj kun la helpo de la esperantistoj de la urbo kie okazos la Renkontiĝo.

d) La grupoj de Barcelono Stelo de Paco kaj Klubo Amikoj de la UNESCO organizos aútobusojn.Oni invitas al la aliaj esperantistoj partopreni en la organizado

-o-o-o-o-o-o-

Pliaj informoj aperos en la estonta numero de HEJS.Tamen ekde nun la Redakcio petas al niaj abonantoj kaj simpatiantoj ke studu ĉiu propra eblecon ĉar ni konstatas ke ĉi Renkontiĝo estos vere interesa kaj eksterordinara unue por la programo kaj due pro la mirindaj naturaj belaĵoj de la urbo.

=================================================================
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
=================================================================

"ESPERANTO FAKO KLUBO DE AMIKOJ DE U N E S C O"

Str. Lauria 12-1 BARCELONO 10

LIBRO EKSPOZICIO

Dum la monato decembro la Esperanto Fako organizis libron Ekspozicion la tagon 20-an de la 19ª ĝis la 21 h. kaj dimanĉon la 21an de la 11ª ĝis la 13ª h.Multaj esperantistoj de Barcelono kaj de aliaj urboj vizitis nin kaj kreis atmosferon tre agrablan kaj amikan.

-o-o-o-o-o-o-

Nia Rideto

Fekunda paneo. Oni cerbumis,en usona urbeto,pri la kialo de subita triobligo de la naskiĝoj dum januaro ,kompare kun la kutimaj ciferoj.Fine,iu memoris,ke konflikto estis okazinta inter du televidaj kompanioj,kiuj pro tio ĉesigis siajn elsendojn,precise naŭ monatojn antaŭe!

-o-o-o--o-o-o

" ESPERANTO FAKO CENTRO EKSKURSIONISTA PUIGKASTELLAR"

Santa Coloma de Gramanet

La Ponencia de Cultura del Excmo.Ayuntamiento y el Centro Excursionista Puigcastellar,invita a todos los amantes de la Cultura (de ambos sexos) al nuevo curso del idioma internacional ESPERANTO que tendrá lugar todos los martes y Jueves de 9 a 10 noche a partir del día 8 de Enero en la Biblioteca Popular "Fernando Valls Taberner" Calle San Carlos 15.

-o-o-o-o-o-o-

Apremder Esperanto no es perder el tiempo,es ganar amigos en todo el mundo.¡¡Compruebelo!

-o-o-o-o-o-o-o-o-

D E S I G D E L N A D A L

Doneu-me pau i salut
amb amor i llibertad,
que el Mal vegi jo caigut,
que el món regni la Bondat!

Deixeu-me que em senti infant
com en temps de les joguines
sens coneixer les espines
que a n'el cor ens van clavant!

Doneu-me l'escalf pairal

Prop dels meus amb poesia

i l'encís de l' Establia

a la Vetlla de Nadal !

Francesc Vilá

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Ĝojoj pasis kaj doloroj ,

iluzioj mortis for,

gajaj kaj malgajaj horoj

trovis eĥon en la kor'.
Ĉie,kiu vivo estas,

iuj ploras , iuj festas

Ĝuu dum la nova jaro,

ĝojon kaj feliĉon vi !

Estu ĝi por la homaro

plua paŝ' al harmoni' !

Liberiĝu el mizero ,

paco nin sur tuta tero!

(JOB)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

JUNULARAJ ABONOJ DE KONTAKTO. Por plifaciligi abonadon al Kontakto por gejunuloj,oni enkondukis novan reduktitan abonkotizon junularan,de 5 nederlandaj guldenoj.Personoj malpli ol 25 jaraj,pagante la junularan kotizon indiki sian naskiĝjaron.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## =S C I E N C A  P R O G R E S O=

Certe la fantaziaj verkoj de Julio Verne,Wels kaj aliaj romanistoj permesis jam al homaro intuicii mirindajn malkovrojn kiuj efectiviĝas plene en la nuntempo malgraŭ ke kelkaj el la teknikaj kaj sciencaj faktoj prezentitaj kaj elvolvinĝintaj paralele al la argumentado de la cititaj aŭtoroj ridigis niajn praavojn kaj naskis la plej akrajn mokojn el la tiamaj kritikistoj kiuj bedaŭrinde ne vidis nur ĝis la pinto de siaj nazoj.

Se ni atente rigardadas nian aktualan progreson,ni konstatos ke dum 50 jaroj la evoluado kaj transformiĝo de la teknikaj kaj sciencaj aplikoj permesas al ni rapide vojaĝi tra la tuta mondo;superflugi ambaŭ poluscjn en malmulte da tempo dank'al potencaj reaktoroj supersonaj;uzi kolosajn kaj luksajn ŝipojn-veraj flosaj palacoj de grandaj kapablecoj kaj komfortoj - kiuj a'ingas la plej malproksimajn punktojn de nia planedo en kelkaj tagoj.Plie,la submara navigacio fare de nukleaj submergeblaj ŝipoj permesos post nelonge,la seriozajn studadojn de la maraj profundaĵoj,en vido de la urĝaj necesaj nutraĵoj por la estonteco,ĉar la manko de novaj manĝeblaĵoj por anstataŭi la ordinarajn prezentas gravan kaj malfacilan problemon nepre solvotan.

Estas sciate ankaŭ ke la bordoj kaj fundoj de la maroj enhavas diversajn kreskaĵojn kaj produktojn kiuj sendube konsistigos vastan provizon por kontentigi la teruran malsaton de vastaj regionoj de la mondo,kompreneble se oni volas kaj scias plene ekspluatadi la submarajn eblaĵojn,fonto de natura riĉeco kiu ne povas neniel perdiĝi.Precipe la algoj kaj aliaj kreskaĵoj troviĝantaj sur-en-kaj sub la oceanakvoj de nia planedo liveros abundajn kvantojn da substancoj kies totala ellaborado postulos la atenton de ĉiuj registaroj kaj la devigan dediĉon de sciuloj kaj kompetentaj esplorantoj. La algoj vivas izolitaj aŭ formas kolonioj.Kelkaj el ili estas manĝeblaj; aliaj estas uzataj kiel sterko kaj multaj estas tre riĉaj je sodo kaj jodo.Ili troviĝas ĝis 400 metroj je profundeco;sed ekde tiu limo,ili ne povas ricevi plu la lumon.

# IMPRESOJ PRI NIA KONGRESO DE ESPERANTO EN "LA LAGUNA"

## III

## INSULO TENERIFO: LA LANDO

Ni elflugis el Madrido,la vetero estis nuba,sed baldaŭ la jeto superflugis super la nubojn.Brilis la suno preskaŭ jam ĉe la horizonto do baldaŭ devis vesperigi.Nur de tempo al tempo tra truo en la nubaro oni povis vidi la tersurfacon.La truoj en la nubaro oftiĝi kaj gradiĝis kaj fariĝis videbla la serpentumo de la rivero Guadalquivir jam proksime al la marenfluo.La Atlanta Oceano ne estis videbla.Ĝin kovris nubaro tiel malalta,ke la nubaro ŝajnis esti la marsurfaco mem.Ĉe la antaŭ horizonto,nemulte videbla do jam noktiĝis,la senfina etendiĝanta ebena nubaro altiĝis kiel monto kaj baldaŭ la aviono superflugis ĝin. El la nuboj estis videbla la staranta silueto de la monto Teido.Ni jam traflugis la insulon Tenerifon.La surterigon pro laŭdire atendi,ke la surteriĝa kampo estu disponebla.Dum kvarono ni trairis la insulon kelkajn fojojn,esti nokto kaj la silueto de La Teido malaperis en la nigra nokto.Sed intensa lumaro estis videbla tra truo en la nubaro, Ĉiufoje,la lumoj proksimiĝis kaj dividiĝis en ruĝecaj kaj bluecajn laŭ la ordinaraj kaj la fluo reskaj elektrolampoj.Estis la ĉefurbo Santa Cruz de Tenerifo.La aviono tiel malsupreniris,ke eĉ estis videbla la denca cirkulado de la aŭtomobiloj sur la stratoj.Aperis la flughaveno kaj meze de densa nebulo kaj pluvante la aviono surteriĝis.Ni eliris el la aviono:Nigra nokto; pluva,nebula j kaj venta vetero;preskaŭ malvarmo.Ni troviĝas proksime al la tropiko kaj en la monato julio.Ni unuafoje piediras sur Insulo Tenerifo okaze de Esperantista Kongreso.

Ĉe la mateno ni frue eliris el la gastejo por rigardi la urbon.La vetero estis pluvema.iom nebula,malvarmeta en somera sezono.La urbo La Laguna kuŝas sur ebena valo.Ĝi havas rektajn ne tre larĝajn stratojn kun la plej multo el la domoj duetaĝaj.Estis dimanĉo en festotagoj,sed la urbo estas kvieta kaj iom malnova. En pasintaj jarcentoj ĝi estis la ĉefurbo de Tenerifo. Unuavide ne multe diferencas de iu ajn hispana urbo.Sur la tegmentoj de la domoj el inter la interspacoj de la

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

tegoloj eliras kreskaĵoj je du spanoj altaj.kio estas kuriozaĵo ne videbla en la hispana duoninsulo. La ĉirkaŭaĵoj de La Laguna estas fekundaj kaj la proksimaj montoj maldense kovritaj de disaj arboj. Tio stranga estas la vetero.Ofte nebulo kovras La Laguna 'n.La ventoj Alisioj,kiuj blovas el Nord-Okcidento tiel malsekaj estas,ke la norda parto de Insulo Tenerifo multempe dum la jaro estas kovrita de nuboj kuŝantaj kiel nebulo sur la tersurfaco mem.La nuboj supreniras la nordaj montoj de La Laguna kaj iras ripozi sur la valo,sur kiu ankaŭ kuŝas la urbo mem.Tamen la suda parto de Tenerifo ne tiel pluvas kiel la norda.Malmulte pluvas,estas varma kaj suna.En la ĉefurbo Santa Cruz de Tenerifo oni jam havas varmon.Okazas kiel en nia duoninsuloj: La nordo,pluva; Andaluzio,seka.

En la unua ekskurso ni vizitis Bajamar'on... Luksaj hoteloj kaj vilaoj ĉe la marbordo.Sed tiu,Klifa kun malgrandaj strandoj.Strange,la sablo tute nigra. La Kanariaj Insuloj estas el vulkana deveno.La rokoj estas nigraj,iom tia la grundo,tute nigra la marborda sablo.La insulo eliris el meze de vulkana fajro.Ĉiu roko,ĉiu monto spegulas sian fajran devenon.Pri tio neniu povas dubi.Oni ne devas serĉi spurojn,ĉio elmontras tian devenon.

La precipa ekskurso de la Kongreso okazis por viziti la ĉirkaŭaĵon de la Teido,La Valon de La Orotava kaj la urbon Puerto de la Cruz. De La Laguna la ŝoseo supreniras,oni preterpasis la flughavenon kaj kulturitajn kampojn kaj baldaŭ oni trairis densan kaj altkreskan arbaron el pinoj.kie ni iom haltis. La arbaro ŝajnis nordá,tiel altaj kaj dikaj estis la pinoj.Ne mankas al ili akvo,nek temperaturo kaj la grundo estas mola kaj profunda.

La ŝodeo pli supreniras ĝis la verto de la montaro je du mil metroj de alteco.En kontrasto, ĉi tie la grundo estas preskaŭ dezerta.Nek arbojnek herbo nur disaj arbustoj (la kanaria "retama" en kiu prae loĝis kaj el kiu havis sian originon la kaĝobirdoj nomataj kanarioj).

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

La nuboj en Tenerifo nur atingas ĝis ĉirkaŭ proksimume mil metroj de alteco.Ĉe la du mil metroj la vetero ĉiam estas sennuba kaj seka.Insulo Tenerifo estas plena da kontrastoj.

La rokoj tute nigraj,ĉio estas el vulkana aspekto.Ni troviĝas ĉe la monto Teido,vere la vulkano Teido ,impone alta 3,700 metroj.La pinta kratero 1700 metroj pli alta ol tie,kie ni troviĝis je du mil metroj en la Hotela Haltejo.Ni estas meze Las Kanjadas,grandega kratero el ok kilometroj de diametro.Unuavide ĝi ŝajnas estinta senmezura fajra buŝego el grandega vulkano.Seriozaj opiniantoj konjektas,ke ĝi estas formita pro tersufaca enfalo.Sed iu ajn estu ĝia deveno,Las Kanjadas aspektas restaĵo el infera fajro.La rokoj elmontras la videcan fajran devenon.La vulkano Teido elstaras tie mem kaj oni rememoras erupciojn.

Ni forlasis Las Kanjadas kaj malsupreniris al La Valo de la Orotava.En proksime tridek kilometroj la ŝoseo malsupreniras pli ol du mil metroj.Ĝi serpentumas tra plej malsimilaj pejzaĝoj.De la dezertaj altaĵoj apud Teido ĝis la ĉemara Puerto de la Cruz,plena da luksaj hoteloj,vilaoj kaj bananĝardenoj.La altaj vulkanaj montoj estas sunlumaj kaj sekaj sed kiam oni malsupreniras ĝis mil metroj da alteco la grundo estas tute kovrita de densa arbaro kaj poste de kulturitaj kampoj kaj disaj kamparanaj dometoj.La nebulo ĉion kovras.En varmeta temperaturo,preskaŭ la sama dum la kvar sezonoj kaj nemankante akvon la grundo havas nekompareblan fekundecon.

Proksime al la Tropiko kaj ĉe Afriko,ĝuante tiel varmetan veteron kaj fekundan grundon ne malprave oni nomis La Kanariajn Insulojn "La Fortunaj Insuloj" kaj tio estas konstatebla vero,eĉ se oni vizitis ilin nur dum kelkaj tagoj.

Mi konsideris la Kanarian Insulon kiel Afrikan Landon,sed la kanarianoj konsideras sin kiel eŭropanoj, aŭ nur kanarianojn.Kiu pravas?.Oni diris al mi,ke la Kanaria Insularo nek estas Eŭropo nek Afriko,ĉar ĝi eliris el la maro pro vulkanaj erupcioj nehavante geologia ajn rilato kun Africo.La Kanaria Insularo estas

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-oo-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

kazaŭ kontinento.Eteta kontinento.Oni povas dubi pri tio sed fakte estas vero,tiel certa kiel la ĉiama printempo kaj la fekunda grundo kio faris,ke jam antikve oni ĝin nomis: "La Fortunaj Insuloj".

GIORDANO MOYA

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

## KLUBO DE AMIKOJ DE UNESKO
## ESPERANTO- FAKO

Strato Lauria 12-1º Barcelono

Sabate,la 21-an de februaro je la 7,30 horo vespere

Profesoro Jesús PALUZIE ,prelegos pri la temo:

" KEMIA PESTO "

Tutkore estas invitataj ĉiuj samideanoj kaj amikoj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## 2-a KULTURA KUNVENO

HEF JUNULARA ESPERANTISTA RESTADEJO HEJS

EN MONISTROL DE MONTSERRAT ( BARCELONO )

Kiel pasintjare HEJS invitas al la esperantistoj kaj simpatiantoj partopreni nian 2-an KULTURAN KUNVENON en Monistrol de Montserrat,kiu okazos la tagojn 26-27-28-29-30 de Marto.

Kiel kutime por la grupojkaj familianoj oni enspezos specialan kotizon kaj samtempe dezirante organizi tendaron ni informas ke estos permesata tendumi senpage en la terenon de la Restadejo.

La malfermo de la Restadejo estos je la 18-a horo de la tago 26-a kaj la fermo je la 17-a horo de la tago 30-a.

HEJS -ESTRARO

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o  -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## INTERNACIA RENKONTIĜO EN JACA

La Hispana Turisma Esperanto-Sekcio (H.T.E.S.)en kunlaboro kun la Esperanto-Societo "Frateco"de Zaragozo,organizas Hispanan-Francan Renkontiĝon en Jaca (Huesca) de 27-29 de junio.

Dum la okazinta Franca-Hispana Renkontiĝo en Perpignan,la Prezidantino de Hispana Turisma Esperanto-Sekcio invitis vin partopreni venontjare Internacian Esperanto-Renkontiĝon en Jaca la 28-an de junio venontjara.Nun,mi povas aldoni ke ĉar en Hispanujo estas ankaŭ oficiale festo la 29-a junio ni organizas la aranĝon de la 27-a ĝis la 29-a junio 1970.Kompreneble la Kompleta kaj oficiala tago estos la 28-a.

La Prezidanto de "Frateco",Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo faris ĉiujn oficialajn demarĉojn.

La Universitato de Zaragoza metis je nia dispono la Internacian Universitaton de Jaca,kie plej eble,ankaŭ ni povos rezervi loĝejon.

Do HEJS-anoj ĝis Jaca.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## 30-a HHISPANA ESPERANTO KONGRESO EN M I E R E S

Ĉiuj la gejunuloj kiuj ne povas partopreni la antaŭan Kongreson en la insulo Kanarias ĉar la malproksimeco de la urbo neebligis,povas ĉijare profiti la okazon ĝui Hispanan Kongreson de Esperanto kaj partopreni en la organizado de nia Junulara Sekcio.

En aliaj numeroj de HEJS-Bulteno oni indikis la neceso trovi novajn kunlaborantojn.Vere kelkaj HEJS-estraranoj estas en la kadro de la estraro dum 10 jaroj kaj volonte aŭ ne volonte ĉiuj geanoj povas kompreni ke ili estas lacaj kaj deziras lasi sian postenon. La problemo estas tre klara kaj oni povas rezumi jene: Ĉu ekzistas en nia movado gejunuloj kiuj estas preta organizi novan estraron? Se jes,nome de HEJS-estraro ni petas al ili ke partoprenu la Kongreson en Mieres kaj nkune studos la eblecon.Se ne .Iom post iom nis junulara Sekcio mortos,do la estonteco de nia Junulara Sekcio estas je la decidon de la novaj generacioj de gejunuloj Pripensu,kaj decidu GEJUNULOJ.

HEJS-estraro

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## HEF- RESIDENCIA JUVENIL ESPERANTISTA HEJS
### Monistrol de Montserrat (Barcelona)

Como en el año anterior HEJS organiza en la Residencia de Monistrol la reunión de Semana Santa que este año tendrá lugar los días 27-28-29-30 de Marzo, por ello deseando solucionar los pequeños errores e inconvenientes del año pasado recomendamos a los asistentes los siguientes detalles.

Cotizaciones individuales:
Socio de HEJS o HEF ....25 ptas día
No socios de HEJS o HEF....30 ptas día
Familias o grupos de esperantistas de un mismo grupo se les cobrará una cotización inferior.
Eksterlandanoj .... sempage.

La Residencia se abrirá a las 6 de la tarde del día 26 y cerrará a las 5 horas tarde del día 30.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Deseando aprovechar los terrenos de la Residencia para organizar un Camping informamos que las personas que lo deseen podrán plantar sus tiendas sin abonar cotización alguna.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Recordamos que la Residencia dispone de agua corriente, luz y cocina a gas butano y calefacción con dos estufas de petroleo y una de butano.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Las personas que deseen reservar plazas dirijan sus peticiones al Sr. Salvador Aragay C/ Bassegoda 40-3-1 B arcelona.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Destacamos del programa provisional (La palabra lo tendrá el tiempo) Excursión a Sant Jeroni.
Visita al Monasterio, Concurso de fuerza y destreza. y para el día 29 se dedicará a plantar arboles los asistentes que lo deseen podrán plantar el arbol que generosamente regalen a la Residencia

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Para las personas que solamente desean visitar la Residencia les recordamos que esta está abierta cada sábado y domingo final de cada mes. Febrero 21-22

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## ESTADO DE CUENTAS EJERCICIO 1969

| | | | |
|---|---|---|---|
| ACTIVO | Cotizaciones socios...... | 1927 | ptas |
| | Reembolsos socios ..... | 5188 | " |
| | Saldo año 1968 ...... | 182 | " |
| | Total | 7297 | ptas |
| PASIVO | Edición Boletín ......... | 3595 | ptas |
| | Gastos Secretaria ...... | 1100 | " |
| | Premio Comella-Basols ... | 500 | " |
| | Gastos reembolsos ..... | 1260 | " |
| | Total | 6455 | ptas |

SALDO EFECTIVO AÑO 1969 .... 842 ptas

CAPITAL ======= 6.505 ptas

Socios que han efectuado el pago de la cotización 1970

Srs.Tor Caspary.Antonio Criach.Tomás Ortiz,Madrida Esperanto Asocio,Ricardo Sans,S, Serrano, P. Claramunt. Club Villanuve y Geltru y Carlos Aragay.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Recordamos a nuestros consocios que la cotización de abono a los boletines de HEF y HEJS serán para este año 1970 de 100 pesetas según acuerdo de la HEF junta Como años anteriores pueden enviar su cotización indistintamente a la Federación o asu sección juvenil.

-o-o-o-o-o-o-

El pasado año nuestros consocios Josep y Juanita Girona fueron papas de un hermoso niño,su nombre ..... Francisco Girona.Deseamos para este nuevo socio infanti felicidad y mucha ventura e igualmente a los padres afortunados larga vida y salud para gozar con la presencia de su primer hijo.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Todas las personas que deseen enviar sus colaboraciones a esta redacción envien sus trabajos al Sr.Araga B assegoda 40-3-1 Barcelona pues el Sr J.Serrano. está de viaje por Europa durante varios meses.

-o-o-o-o-o-o-

C

MADERAS
CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24
BARCELONA (14)

jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares, billarines, etc.

instalación sin ningún gasto para el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Teléf. 230 29 41
BARCELONA

VENDO RETALES

*para falda o pantalón*
*directos de fábrica*

*J. Cardellach*

C. Salvatierra, 99
TARRASA